

Prezo: 7 €

www.satesperanto.org

Novembro–decembro 2014 | n-ro 11–12 (1313–1314)



Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE SAT

Temdosiero



Ukrainio

SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

& KoKino




Halo de Gímio,
de Ken' Louč' p. 33



Manği, dormi, morti,
de Gabriela' Pilčero p. 33

& Temdosiero: Ukrainio



Karaj gekamaradoj,

J.-F. Blin, kiu kontrakte kun la PK enpaĝigis *Sennaciulon* ekde aprilo 2014, en septembro treege malsaniĝis. Fronte al ĉi tiu situacio, Andreo Hoaro transprenis la enpaĝigan taskon, kaj zorgis pri la enpaĝigo de la numeroj 7–8, 9–10 kaj 11–12. Ekde ĉi tiu lasta numero, kiun vi nun ĉe-mane havas, Andreo ne plu povos zorgi pri la transprenita tasko. La tuta skipo ege dankas al li, pro lia efika kunlaboro. Post du penigaj jaroj, tiu fingrobateto ebligis re-akuratigi la aperitmon de nia revuo.

Do, kamaradoj pretaj transpreni tiun enpaĝigan taskon ekde la numero 1–2 de la jarkolekto 2015, t.e. *plejeble rapide*, estas petataj anonci sin ĉe la redakteja adreso. Eblos tiam diskuti pli detale pri la laborkondiĉoj. Tamen, jen priskribo de la enpaĝiga laboro:

1. La enpaĝiganto ricevas en unu mesaĝo kompilon de ĉiuj lingve kontrolitaj kaj ordigitaj artikoloj, kun kolekto de uzeblaj bildoj.

2. Li aŭ ŝi poste resendas al la redaktoskipo PDF-provon, kiu ebligas kontroladon de la enpaĝigo, diversajn refajnigojn, kaj eventuale forigon de gravaj plu restantaj lingvaj eraroj. Tamen, ne plu povas okazi gravaj lingvaj repri-laboroj de l' artikoloj. Dum tiu interŝanĝo ĝenerale necesas rekrei duan kaj trian PDF-provojn por atingi plene kontentigan rezulton.

3. La enpaĝiganto fine sendas al la presisto la enpaĝigitan dokumenton en PDF-dosierformo.

Necesaj scioj kaj kapabloj: bona regado de perkompuita eldon-programo (InDesign, Scribus aŭ aliaj), baza regado de grafikilo (Photoshop, Gimp aŭ aliaj), scio pri la viki-sintakso kaj ties konvertado al diversaj dosierformoj, fundamentaj konoj pri tipografio.

Ne timu anonciĝi eĉ se vi dubas pri viaj kapabloj rilate al tiuj teĥnikaĵoj. Inter la redaktoskipanoj estas helpopretaj kamaradoj, kiuj povos faciligi viajn unuajn paŝojn ĉi-terene.

Intertempe, la redaktoskipo plu funkcias, do daŭre kolektas artikolojn, korektas ilin kaj ordigas ilin por pretigi la materialon por enpaĝigo. La anoncitaj limdatoj pri sendo de la materialo do daŭre validas.

Kalkulante je ĉies helpo, vin salutas

*La Redaktoskipo de Sennaciulo
kaj la PK de SAT*

Venontaj dosiertemoj

ĈU MALDEKSTRULOJ POVAS ESTI RIĈAJ?

Kunordiganto mankas.

Kontribuoj bonvenaj ĝis la 15-a de decembro.



SCIENCO

Kunordiganto mankas.

Kontribuoj bonvenaj ĝis la 31-a de januaro.

Enhavo

Enhavo

TEMDOSIERO "UKRAINIO"

- 4 *Enkonduko* — Kleriga mozaiko KANI
- 5 Ukraina faden-mozaiko PLUR-AŬTORA
- 10 Kiel kompreni Ukrainion? PEDRO HERNÁNDEZ
- 12 Teroro en Ukrainio iĝis realo TRADUKIS DJÉMIL
- 15 Letero al Galicio ANONIMA
- 16 Lingvoj en Ukrainio KANI
- 18 Tri SAT-anaj voĉoj el Ukrainio PLUR-AŬTORA
- PLU EL PASINTA KONGRESO**
- 20 La bezonoj por familioj diskuti... MICHAEL WADE
- 22 Vizito al Patagonio HILARY (BILL) CHAPMAN
- 24 Por ke homoj revenu al naturo... EMMANUEL ROLLAND
- 26 Civitanoj loke konstruas ontecon PHILIPPE STRIDE
- 27 Kial necesas krei indicon... XAVI ALCALDE
- LIBERECANA FRAKCIO**
- 29 Kunlaboro kun la liberecana... MIGUEL FERNÁNDEZ
- BELETRO**
- 30 Tra la kvartalo ALFREDO LÓPEZ CARRILLO
- TEATRO**
- 32 Unua teatra ekzercio MARCEL REDOULEZ
- Pludoni la teatran torĉon ARNO LAGRANJ'
- KOKINO**
- 33 Halo de Ĝimio MARKOVO-VITO
- Manĝi, dormi, morti FLORA MARKOV
- INTELEKTA MEMDEFENDO**
- 34 Solvoj de l' cerbumigoj de la n-ro 9-10 2014 DIANA RIŜAR
- 35 Novaj cerbumigoj DIANA RIŜAR
- El iloskatol': la alvoko al nescio ANDREO HOARO
- FRAKCIA VIVO**
- 36 Frakcia raporto de Vegetara Sekcio MARKOVO-VITO
- 37 Kial Vegetara Sekcio en SAT? VEGETARA SEKCIO
- Liberpensula Frakcio: deklario
- SAT-ANOJ AKTIVAS**
- 38 Eo en la kultura vivo de Madrido MIGUEL FERNÁNDEZ
- 39 Filmo "Eo" en japana kongreso MIYAZAWA NAOTO
- POEZIO**
- 23 Principo espero CEZAR
- 40 Ĉe kuracisto Zamenhof EDER BENEDETTI & CEZAR



Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas.

Kontribuojn sendu al:

sennaciulo.redaktejo@gmail.com